# Jarkunveno de Grupo Esperantista de Trondheim, 14an de oktobro 2024

ĉe Ulf Stenhaug, Arne Solbergs v. 32

**1. Aprobo de la kunvoko**
La ĉeestantaro aprobis la kunvokon kvankam oni dissendis la tagordon nur hieraŭ.

**2. Malfermo de la jarkunveno**
La prezidanto malfermis la jarkunvenon.

**3. Aprobo de la tagordo**
La jarkunveno aprobis la tagordon.

**4. Elekto de kunvena prezidanto, raportanto kaj 2 subskribontoj de la protokolo**
Torstein Kvakland elektiĝis kiel kunvena prezidanto. Kiel raportanton oni elektis Jardar Eggesbø Abrahamsen. La protokolon subskribos Herman Ranes kaj Ulf Stenhaug.

**5. Jarraporto 2023**
Oni kontrolis la jarraporton kaj aprobis ĝin.

**6. Jarkalkulo 2023**
Kasisto Ulf Stenhaug prezentis la jarkalkulon. Ni tralegis la jarkalkulon. Revizoro Bergny Dahl kontrolis la jarkalkulon kaj trovis ĝin en ordo. La jarkunveno aprobis la jarkalkulon.

**7. Elektoj**
La elekta komitato ne ĉeestis, kaj la estraro ankaŭ ne memorigis la elektan komitaton pri ties taskoj. La jarkunveno decedis reelekti ĉiujn:

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Torstein Kvakland (reelekto) |
| Kasisto: | Ulf Stenhaug (reelekto) |
| Sekretario: | Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto) |
| Estrarano: | Herman Ranes (reelekto) |
| Anstataŭanto: | Christian Fossen (reelekto) |

Revizoro: Bergny Dahl (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)

La jarkunveno decidis proponi reelekton de la elekta komitato, kaj poste la jarkunveno elektis laŭe:
Jørgen G. Bosoni (reelekto, kondiĉe ke li pagos kotizon) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

**8. Envenintaj proponoj**
Neniu propono envenis.

**9. Fermo de la jarkunveno**
La prezidanto de GET dankis pro la fido al la estraro, promesis pluan laboron, kaj fermis la jarkunvenon.

Antaŭ la jarkunveno ni kune bakis panetojn, kiujn ni manĝis kun granda ĝuo kaj antaŭ kaj post la jarkunvena parto de la klubkunveno. Okazis multe da babilado.

Dum la jarkunveno ĉeestis 5 fizike kaj 1 rete, entute 6.

Raportis: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Subskribis: Herman Ranes Ulf Stenhaug

**Styret på norsk**

Under sak 7 på årsmøtet i Grupo Esperantista de Trondheim (Trondheim esperantoklubb) mån. 14.10.2024 vart dette styret valt:

Leiar: Torstein Kvakland
Kasserar: Ulf Stenhaug
Sekretær: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Styremedlem: Herman Ranes
Vara: Christian Fossen

Referent: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Underskrivarar: Herman Ranes Ulf Stenhaug